

Esperanto  
V-19479/54 (1985)

# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

PORPACA VOĈO  
DE VERKISTOJ

REGU PACO SUR  
LA BALKANOJ

KVARA NACIA  
MEDICINISTA  
E-KONFERENCO

KURSO POR  
E-JURNALISTOJ

HELPE AL  
TR. HRISTOVSKI

SENMORTAJ  
NOMOJ

JAPANIO —  
MALPROKSIMA  
KAJ PROKSIMA

ENLANDA MOVADO





## PORPACA VOĈO DE VERKISTOJ

De la 23-a ĝis la 25-a de oktobro 1984 en Sofio okazis la V Internacia Renkontiĝo de Verkistoj sub devizo „La paco — espero de la planedo“. Partoprenis 138 verkistoj el 53 landoj.

Sofion venis elstaraj majstroj de la plumo por pledi por paca estonto. Honora prezidanto de la Renkontiĝo oni elektis Erskine Caldwell (Usono).

La diskutoj okazis en tri laborgrupoj. Ili tuŝis problemojn de la romano kaj de la verkado antaŭ la komenco de la nova jarcento, kaj ankaŭ demandojn de la tradukado kaj eldonado de libroj.

La partoprenantoj en la Renkontiĝo unu-anime aprobis alvokon al ĉiuj popoloj, ŝtatoj kaj registaroj por paco kaj reciproka kompreniĝo.

La membro de la Redakta Komitato de „Bulgara Esperantisto“ Dimităr Haĝiev renkontiĝis kun du el la partoprenintoj en la V Internacia Verkista Renkontiĝo Sofio'84 — la aŭstralia verkisto Judah Waten el Melburno kaj la kanada poetino Miriam Waddington el Toronto kaj petis ilin adresi mesaĝojn al la bulgaraj esperantistoj kaj al la legantoj de nia revuo. Ili afable plenumis lian peton.

„Al la esperantistoj de Bulgario salutojn de aŭstralia verkisto, kiu ĵus partoprenis la V-an Internacian Verkistan Renkontiĝon, realigitan sub la devizo „La paco — espero de la planedo“.

La esperantistoj, pro sia naturo mem, estas ardaĵ defendantoj de la Paco, ĉar nur en paco povas ekzisti internacia lingvo. Ni unuigu niajn penojn por preventi la militon!

Al mi estis agrable renkontiĝi kun s-ro Dimităr Haĝiev, kiu reprezentadis vian landon en Aŭstralio, kie mi unuafoje konatiĝis kun li. Per propagando de Esperanto li kontribuas por la interproksimiĝo de la popoloj de la mondo.“

Judah Waten

„Bondezirojn kaj salutojn el Kanado al ĉiuj Esperanto-parolantoj kaj legantoj de ne-Esperanto-parolantino.“

Miriam Waddington

Jen kelkaj notoj pri la vivo kaj verkaro de ambaŭ verkistoj, kompilitaj de D. Haĝiev.

**Judah Waten** (legu: Guda Ŭotn) estas elstara progresema aŭstralia verkisto (romanisto, aŭtoro de rakontoj kaj literaturisto) kaj publika aganto. Li naskiĝis en 1911 en Odeso (USSR), de kie ankoraŭ estante infano elmigris en Aŭstralion kun siaj gepatroj.

Ĝis nun li aperigis 13 librojn: naŭ romanoj, du kolektoj de rakontoj, unu libro pri vojaĝimpresejoj (de Odeso ĝis Odeso) kaj unu libro pri la tendencoj en la aŭstralia literaturo. Krome, kune kun Stephen Murray li kompilis la kolekton „Aŭstraliaj klasikaj rakontoj“. En siaj romanoj Judah Waten prezentas ĉefe la vivon de la elmigrintoj. Lia lasta verko estas „Scenoj el la revolucia vivo en Aŭstralio“.

Judah Waten estas konsiderata kiel klasikulo de la socia realismo en Aŭstralio.

Judah Waten partoprenas aktive la batalon por defendo de la paco. Li estas sincera amiko de Bulgario, kiun li vizitis foje. Kun ĝi estas ligita ekde la tempo de la Lejpciga proceso en 1933, kiam li gvidis la Nord-Melburnan Komitaton por defendo de Georgo Dimitrov.

**Miriam Waddington** (legu: Miriam Ŭodingtn) naskiĝis en Winnipeg (Kanado) kaj studis en sia naskiĝurbo, Otavo, en Toronto kaj Filadelfio. Ŝi specialiĝis pri sociala laboro kaj pri angla lingvo. Post kiam ŝi laboris kiel oficistino kaj instruistino pri socialaj problemoj dum la kvardekaj kaj kvindekaj jaroj, ŝi ŝanĝis profesiojn kaj nun estas profesorino de angla kaj kanada literaturoj en la Universitato York en Toronto.

Sia verkista kariero komenciĝis en la kvardekaj jaroj. Ŝi aperigis dek unu versaĵarojn kaj estas aŭtoro de kritika studaĵo pri A. M. Klein. Krome, ŝi publikigis dekojn da kritikaj artikoloj en diversaj revuoj, rakontojn kaj tradukojn de poeziaĵoj kaj prozaĵoj el jida kaj germana lingvoj.

En tiu ĉi numero, sur paĝo 7 ni publikigas en Esperanta traduko de Dimităr Haĝiev du ŝiajn versaĵojn, ambaŭ el la Kolekto „The price of gold“ (La prezo de la oro), 1976.



# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 54

JANUARO

1 • 1985

## REGU PACO SUR LA BALKANOJ!

En oktobro pasintjara Ateno — la bela ĉefurbo de nia suda najbaro Grekujo, akceptis pli ol 260 verdstelanojn el Bulgario, Jugoslavio kaj Grekujo, venintajn por trakti gravan temon — „Esperanto kiel rimedo de proksimiĝo de la balkanaj popoloj“. Kun granda bedaŭro ni konstatis, ke esperantistoj el la ceteraj tri landoj — Rumanio, Turkio kaj Albanio, ne sukcesis veni.

La kongreso estis inaŭgurita la 21-an de oktobro en bela halo de la Olimpika Stadiono. En la oficiala prezidantaro okupis lokojn: la ĉefurbestro de Ateno s-ro Dimitris Beis — alta protektanto de la kongreso, d-rino Maria Pontika, Pinelopi Karahaliu kaj Kostas Kiriakos — prezidantino kaj ĝenerala sekretario de Helena Esperanto-Asocio, prof. d-ro Savas Tsiturides kaj Aleko Fragias — prezidanto kaj sekretario de la Loka Kongresa Komitato, la reprezentantoj de la balkanaj E-asocioj: Kunĉo Vălev kaj Dimităr Papazov — ĝenerala sekretario kaj organiza sekretario de Bulgara Esperantista Asocio, Radiša Kovaĉević kaj Stojan Kocovski — el la Jugoslavio Esperanto-Ligo.

Per sinceraj vortoj bonvenigis la kongresanojn s-ro Tsiturides, kiu prezidis la inaŭguron. Li donis la parolon al s-ro Beis, kiu tre amike salutis la ĉeestantojn. Inter alie li deklaris, ke li plene dividas la opinion, ke Esperanto, kiel neŭtrala komuna lingvo por la balkanaj popoloj, paralela al la naciaj lingvoj, povas esti tre utila: ĝi plimultiĝos kaj larĝigos la kampojn de kunlaborado kaj pliprofundigos la sentojn de reciproka estimo, amikeco kaj bonnajbareco inter la balkanaj popoloj, kontribuos al la firmigo de la paco sur la Balkanoj. S-ro Beis proponis, ke grupo da infanoj el la balkanaj landoj somerumu en 1985 en Grekujo kune kun grekaj infanoj. La reprezentanto de Bulgario K. Vălev emmanigis al s-ro Beis Esperanto-donaĉon. La kongreson salutis ankaŭ reprezentanto de la jugoslavio ambasado.

Per tio finiĝis la oficiala parto de la inaŭguro. Post malgranda paŭzo sekvis la dua parto. Salutis varme la kongresanojn s-rino Pontika kaj

esprimis dankon al tiuj oficialaj grekaj instancoj, kiuj helpis kaj subtenis la organizadon de la kongreso: la urbestro de Ateno, la Ministerio de Kulturo kaj Sciencoj kaj la Ministerio de Junularo kaj Sporto, la Greka Turista Organizaĵo kaj la Nacia Banko de Grekujo. En la nomo de BEA salutis K. Vălev, en la nomo de JEL — Radiša Kovaĉević.

Sekvis brila festa parolado de s-ro Spiros Sarafian, lige kun la ĉefa temo de la kongreso. S-ro Sarafian substrekis, ke la rilatoj inter la balkanaj popoloj ne estas demando nur de la balkanlandaj registaroj, sed ili estas demando unualeke de la balkanaj popoloj mem. Estas tamen necesa lingva komunikilo inter la ordinaraj homoj tra la limoj de la balkanaj popoloj, des malpli iu el la t. n. „grandaj lingvoj“ (angla, franca, rusa ktp.) Sed por ke Esperanto fariĝu vera komunikilo inter la balkanaj popoloj, la esperantistoj en ĉiu aparta lando devas obstine, saĝe kaj laŭplane labori. Tamen labori ne izolite unu de la alia, sed komune, kunorde, man-en-mano, sub la gvido de kunordiga organo. Fine s-ro Sarafian apelaciis al la kongreso subteni la pri ponon de la greka registaro, ke estonte la olimp kaj ludoj okazu konstante en Grekujo — la patrujo de tiuj ludoj, — por konservi puraj ties spiritojn kaj noblajn celojn. Li alvokis la kongresanojn subteni ankaŭ la postulon de la greka popolo pri revenigo de la forrabitaj skulptaĵoj de la Partenono, kiuj nun ormanas la Britan Muzeon en Londono.

Per la festa parolado de s-ro Sarafian, tondre aplaŭdita de la tuta kongresanaro, finiĝis la inaŭguro.

Plue dum la kongresaj tagoj lige kun la ĉefa temo de la kongreso estis faritaj ankoraŭ sep prelegoj fare de reprezentantoj de la tri landoj: Dimităr Papazov parolis pri la proksimiĝanta 100-jara jubileo de Esperanto kiel grava faktoro por aktivigo de la kontaktoj kaj kunlaboro inter la esperantistoj el la balkanaj landoj sur la kampoj de kulturo, edukado, scienco kaj arto. Mustafa Resulović el Jugoslavio — pri la bona tradicio de kunlaboro inter la balkanaj esperantistoj,



Kunčo Vălev, ĝenerala sekretario de BEA, enmanigas donacon al la urbestro de Ateno — Dimitris Beis, en ĉeesto de d-rino Maria Pontika kaj d-ro Savas Tsitourides.

kiun oni devas daŭrigi, larĝigi kaj profundigi. **Maria Toleva**, direktorino de Internacia Esperanto-Kursejo, rakontis pri la laboro de tiu grava Esperanto-centro kaj alvokis la ĉeestantojn vaste popularigi ĝin. **Judita Hudeček** el Zagreb (Jugoslavio) prezentis novan metodon de rapida instruado de Esperanto, kiu disvastiĝas sukcese sub la nomo Zagreba metodo. **Evdokia Patmiu** el Ateno faris solide argumentitan prelegon pri la neceso, ke ĉiu esperantisto ekregu bone la lingvon, kio povas rezulti nur el serioza laboro kaj konstanta uzado de Esperanto sen „krokodilado“. En la dua parto de sia prelego Patmiu parolis pri la Esperanto-propagando. **Ŝi** substrekkis, ke la nuntempa lingva situacio en la mondo malhelpas la facilan kaj vastan komunikadon inter la homoj tra la ŝtatlimoj, bremsas la penadon konstrui veran amikecon inter la popoloj kaj paco en la mondo.

Bazan prelegon pri aktivigo de la kultura kaj instrua Esperanto-laboro sur la Balkanoj faris Kunčo Vălev. Li substrekkis, ke Esperanto estas vojo de egaleco inter la balkanaj popoloj sur la kultura kampo. Nur per Esperanto la ordinarnaj balkananoj povas senpere kaj tute facile konatiĝi, ekkoni siajn komunajn interesojn kaj unuigi sin por defendi siajn naciajn kulturojn kaj la sendependecon de siaj landoj. La balkanaj esperantistoj devas labori kaj batali per ĉiuj fortoj por transformiĝo de la Balkanoj en zonon de paco, sekureco kaj interpopola amikeco. K. Vălev faris multajn proponojn pri konkretaj kulturaj aktivecoj, kiuj estis inkluditaj en la decidojn de la

kongreso (pri kulturaj kaj informaj centroj, balkanaj festivaloj, literaturaj konkursoj, teatraj turneoj, E-muzeoj, renkontiĝoj de esperantistoj laŭ profesioj kaj intereso, prelegvojaĝoj, interŝanĝo de E-lektoroj kaj kursanoj ka.

Enkadre de la kongreso okazis aparta virina kunveno. Pri la laboro de la Virina Komisiono de UEA kaj de BEA parolis Belka Beleva el Sofio. La kunveno rekomendis eldonadon de Balkana Virina E-Bulteno.

La demandoj pri aktivigo de la kunlaboro inter la balkanaj esperantistoj estis traktitaj ankaŭ en du liberaj publikaj kunvenoj.

La ferma kunsido de la kongreso akceptis kelkajn dokumentojn, inter kiuj ankaŭ jenajn pli gravajn decidojn kaj rekomendojn: oni organizu en ĉiu aparta lando kultural kaj informan centron, komenciĝu organizado de balkanaj E-festivaloj, reciproka gastado de E-teatroj, kantgrupoj, ĥoroj ka. de renkontiĝoj kaj konferencoj laŭ profesioj kaj intereso, de tagoj de la E-kulturo de balkanaj belartaj konkursoj, interŝanĝo de instruistoj de Esperanto, de gekursanoj, laborbrigadoj ka. La kongreso rekomendis al ĉiuj landaj E-asocioj kunlabori al la oficialaj komitatoj por balkanlanda kunlaborado kaj amikeco.

Oni klare vidas, ke la Dua Kongreso de la Balkanaj Esperantistoj akceptis vastan agadprogramon. Por ĝia realigo la kongreso elektis provizoran kunordigan komitaton.

Enkadre de la bonege organizita kongreso okazis vico da interesaj kulturaj kaj aliaj aranĝoj: interkona vespero, koncerto, vespero de filmo pri

la grekaj tradiciaj loĝlokoj, ekskurso tra la urbo, bankedo, oficiala akcepto en la Atena Komunumo ka. Aparte notindaj estas la tuttaga ekskurso al Delfoj (kun la fama templo de Apolono) kaj la teatra vespero. La Bulgara Esperanta Teatro brile prezentis la komedion „La milionulo“ de Jordan Jorĵkov. La publiko longe aplaudis la artistojn.

La greka gazetaro kaj televido bone spegulis la laboron de la kongreso. Tri el la plej popularaj gazetoj — „Etnos“, „Katimerini“ kaj „Nea“, donis ankaŭ informojn pri la E-movado en la apartaj balkanlandoj.

La Kongreso en Ateno malfermas novan paĝon en la vivo de la balkanaj esperantistoj. Kampovastega kaj nekulturita atendas siajn plugantojn kaj semantojn. Ĉiu Esperanto-aktiveco sur tiu kampo estos briko en la komuna balkana domo,

en kiu devas flori kulturo kaj humanismo, spirito de bonnajbareco, amikeco kaj sincera kunlaboro, en kiu devas regi la paco.

K. IVANOV

## PROVIZORA BALKANA ESPERANTISTA KUNORDIGA KOMITATO

(elektita de la Dua Kongreso de Balkanaj Esperantistoj en Ateno (20—25. X. 1984)

El Bulgario: Kunĉo Vălev — prezidanto, Dimităr Papazov — sekretario, Hristo Ĝelebov;

El Grekujo: Maria Pontika, Kostas Kiriakos, Aleko Fragias; El Jugoslavio: Stojan Kocovski, Mustafa Resulović, 1 loko rezervita;

El Rumanio: 3 lokoj rezervitaj;

El Turkio: 1 loko rezervita

El Albanio: 1 loko rezervita.

## Kvara Nacia Medicinista E-Konferenco

La 16-an — 18-an de novembro pasintjare sub devizo „Per Esperanto — al sano, paco, kunlaborado kaj interkompreniĝo“ okazis la IV Nacia Medicina E-Konferenco kun la partopreno de pli ol 70 medicinistoj el la tuta lando. La konferenco estis gvidata de prof. d-ro Kiril Popov, prezidanto de la Medicina Sekcio ĉe BEA.

D-rino Tjuran Omer el Loveĉ malfermis la konferencon per mallonga salutparolo al la ĉeestantoj kaj donis la parolon al prof. d-ro Kiril Popov, kiu en sia raporto faris detalan revuon de la aktivado de la Medicina Sekcio dum la tuta periodo de ĝia ekzistado.

Ing. Petăr Todorov, vic-prezidanto de BEA kaj membro de la Estraro de UEA, salutis la esperantistojn-medicinistojn kaj bondeziris al al ili utilan kaj fruktodonan laboron.

En la raporto de d-ro Ananoŝtev el Smoljan, legita antaŭ la konferenco, li emfazas la efikecon de kuracado per dispensariigo de malsanuloj.

Dum la Interkona Vespero al la ĉeestantoj estis proponita riĉa programo el rodopaj kantoj kaj dancoj, plenumitaj de folkloraj ensembloj el urbo Lâki.

La 17-an de novembro la konferenco daŭrigis sian laboron sub la prezidanteco de d-ro L. Conev.

D-ro Strezov el Smoljan detale informis la ĉeestantojn pri la stato de la medicina priservado de la loĝantaro en la distrikto de Smoljan, kiu nun okupas frontan lokon inter la ceteraj distriktoj de la lando.

D-rino Bukovinova el Burgas faris detalan informon pri la kreo kaj evoluo de la E-movado

en la distrikto de Burgas, substreka ĝiajn ligojn kun la abstinenculaj, turistaj kaj jun-komunistaj organizaĵoj.

En sia raporto d-ro Conkovski el Smoljan dividis sian sperton pri kuracado de infarkto.

D-rino Popova el Jambol raportis pri temo „Historiaj, ekonomiaj kaj ekologiaj interrilatoj de urbo Jambol kaj rivero Tunĝa“. Si prezentis maltrankviligajn donitaĵojn el la esploro de la akvo, farita de specialistoj kaj parolis pri la zorgoj por defendo de la naturmedio en la distrikto.

D-rino Skorĉeva el Varna faris mallongan informon pri la unuaj kuracistoj en Varna — pioniroj de la ideo pri senpaga medicina helpo, kaj pri la eldonado de la unuaj medicinaj revuoj. Si rakontis ankaŭ pri siaj impresoj de la 69-a UEA-kongreso en Vankuvero, Kanado.

Kun tre granda intereso oni aŭskultis la raporton de d-ro Haĝihristev pri temo „La longvivado en la distrikto de Smoljan“.



La prezidantaro

D-ro doc. Silev el Plovdiv informis pri la atingitaj sukcesoj ĉe preparo de junaj medicinaj kadroj en la ĵus malfermita en Pazarĝik filio de la Plovdiva Medicina Fakultato.

En sia raporto „Biosfero kaj vivo“ Stefka Ĉenkova el Sofio tuŝis la problemon pri influo de la biosfero sur la apartan individon. Si citis jenajn vortojn de la sovetia scienculo Vertinskij: „La homoj profitas la atingojn de la kulturo kaj civilizo aŭ por sia progreso, aŭ por sia memneniigo“.

D-ro Vavrek el V. Târnovo parolis pri temo „La propra ekzemplo en la batalo kontraŭ drinkado kaj fumado“.

D-rino Lukanova el Sofio, sekretario de la Medicina E-sekcio ĉe BEA, tuŝis la problemon pri sanitara profilaktiko kaj sanitara klerigo, speciale en la stomatologio.

En sia raporto prof. Pejĉev el Plovdiv substrekis la amasan toksigon rezulte de fumado kaj la batalon kontraŭ ĝi per la helpo de la cigaredoj ANTITAB, preparitaj el speciala kombino de drogherboj (laŭ lia recepto), kiuj efikas sur la refleksogenajn zonojn de la fumanto kaj kaŭzas abomenon al la nikotino.

D-rino Tjuran Omer tuŝis la problemon pri alkoholismo kaj ĝian ligon kun iuj psikaj malsanoj.

La raporton de d-rino Raĉeva pri la rolo kaj signifo de la klinika farmakologio kaj ĝia estonta evoluo en Bulgario prezentis la farmakologo Benbasat el Sofio.

Kiel lasta ero en la konferenca programo, antaŭ la partoprenantoj estis projekciita filmo (laŭ scenaro kaj materialoj de Jana kaj Vladimir Cikalov) pri la vivo kaj agado de preskaŭ nekonata bulgaro el Ruse — d-ro Vasil Marinov Käsogledov, studinta kaj laborinta en Rusio, al kiu li fordonis siajn fortojn kaj talenton de sperta kirurgo.

En la nomo de la ĉeestantoj prof. Popov dankis al Jana Cikalova pro la realigo de tiu nobla laboro.

Nun ĉiu sukceso en la scienco kaj la arto, ĉiu grava evento estiĝas komuna travivaĵo de la homaro. Des pli necesa estas internacia lingvo en la sfero de medicino, defendanta la plej valoran homan posedaĵon — la vivon kaj la sanon.

D-rino JORDANKA POPOVA, Jambol

## AKUŜISTINA FESTOTAGO

La 21-an de januaro en Bulgario oni festas la Tagon de Akuŝhelpo. En tiu tago la virinoj esprimas sian dankon al akuŝistinoj kaj ginekologoj, kiuj unuaj prenas en siaj manoj la ĵus naskitajn bebojn. Festas ankaŭ la virinoj el vilaĝo Rudarci. La salono en nia nova kulturdomo estas preparita por la festo. Preter la muroj estas ordigitaj tabloj kaj seĝoj. Bukedoj el blankaj kaj ruĝaj diantoj ornamas la tablojn. Unu post la alia venas virinoj kun plenaj manoj. Sur la tabloj aperas pladoj plenaj de manĝaĵoj kaj sukeraĵoj: tortoj, kukoj, bakita viando, legomkonservaĵoj, ĉio preparita de la virinoj mem. Ne mankas freŝaj dolĉaj pomoj.

Stanka Metodieva, prezidantino de la Patrolanda Fronto, salutas la virinojn kaj donas la parolon al la loka akuŝistino Nikolova. La virinoj delonge konas kaj estimas ŝin. Ŝi helpis al multaj el ili ĉe la akuŝado. Iom konfuzite, kun ruĝaj vangoj, kiuj ordinare estas palaj, ŝi komencis sian paroladon:

„Antaŭ 26 jaroj, kiam mi estis juna akuŝistino, multaj virinoj naskis hejme. Pezan herdon ricevis nia popolo de la burĝa ŝtato. Mankis akuŝdomoj. Estis familioj kun belaj

domoj, sed ne estis malmultaj ankaŭ familioj, kiuj loĝis en unu ĉambro. Tie ofte la infanoj ĉeestis la akuŝon, kvankam la plenaĝuloj provis ilin endormigi.

En nia lando nun laboras 1100 ginekologoj kaj pli ol 6500 akuŝistinoj. La nombro de la akuŝginekologoj kreskis de 7142 al 9174 kaj de infandomoj — al ĉirkaŭ 72 000. Nuntempe neniu virino naskas hejme. La suĉinfanoj estas vestitaj en belaj vestoj kaj kreskas en belaj kaj higienaj novaj domoj. Ni estas fieraj, ke en nia lando la zorgoj pri infanoj kaj patriroj okupas la unuan lokon inter aliaj landoj de Eŭropo.“

Post la lastaj vortoj de la akuŝistino ap-laŭdataj de la virinoj, ŝi ricevis multajn donacojn kaj florojn.

Poste, sub la sonoj de gramofono junaj kaj maljunaj virinoj komencis danci. Kolektiĝis viroj por rigardi kiel la virinoj gaje festas.

Tiel pasis la akuŝistina festo — atesto pri la granda amo de la bulgaro al la infanoj kaj la vivo.

RAJNA AGONCEVA,  
akuŝistino

# KURSO POR ESPERANTISTAJ ĴURNALISTOJ

Jam plurajn jarojn en Bulgario estas eldonataj bulgaraj kaj internaciaj esperantaj revuoj kaj bultenoj, kiel ekzemple „Bulgara Esperantisto“, organo de BEA, „Internacia Ĵurnalisto“, organo de TEĴA, „Paco“, organo de MEM, „Interligilo“ — informilo de IPTEA, „Kolektanto“, „Pacaktivulo“ k.a. La bezono de spertaj esperantistaj ĵurnalistoj estas ĉiam pli akra — estas necesaj novaj kunlaborantoj por la E-gazetaro.

Por kontentigi tiun bezonon la Internacia

cajn artikolojn, intervjuon, biografian skizon pri eminentaj personecoj ktp. Surbaze de sia propra sperto la kursgvidanto donis multajn interesajn ekzemplojn por ilustru siajn lekciojn kaj fari ilin pli facile kompreneblaj. Ĉiu lekcio provokis multajn demandojn flanke de la kursanoj, al kiuj D. Ĥitrov detale kaj sperte respondis. Li ankaŭ tuŝis la plej gravajn problemojn de nia nuntempo — defendo de la mondpaco, protektado de la vivmedio, helpo al la evolulandoj en Azio kaj Afriko, kaj taskojn



La partoprenantoj en la kurso por esperantistaj ĵurnalistoj

Esperanto-Kursejo en Pisanica duan fojon — de la 14-a ĝis la 18-a de novembro j. k., okazigis kurson por esperantistaj ĵurnalisto. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 20 gekursanoj el la tuta lando, precipe filologoj kaj instruistoj — kunlaborantoj de esperantistaj kaj nacilingvaj eldonoj.

La kurson denove gvidis Donĉo Ĥitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ kaj ĝenerala sekretario de TEĴA.

En 14 bone preparitaj lekcioj, dividitaj en du partojn — teoria kaj praktika, la kursgvidanto, sperta multjara ĵurnalisto, sukcesis kapti la atenton de la gekursanoj kaj klarigi al ili la karakterizajn trajtojn kaj la ĉefajn taskojn de la esperanta ĵurnalistiko, la kvalitojn, kiujn la Esperantista ĵurnalisto devas posedi kaj disvolvi. En la praktika parto de la kurso D. Ĥitrov konigis al la gekursanoj la plej ofte uzatajn en la ĵurnalista praktiko ĝenrojn — informon, raportaĵon, diversspe-

de la esperantistaj ĵurnalistoj koncerne la plej honestan kaj objektivan klarigon de tiuj problemoj en niaj E-revuoj.

Paralele kun la kurso de ĵurnalistiko, por la partoprenantoj estis organizita „fulma“ kurso de Esperanto, kiun gvidis la elstara bulgara E-lektoro laŭ la ĈE-metodo — docento Georgi Dimov el Varna, bone konata ankaŭ al multaj alilandaj esperantistoj. Speciale por la kursanoj li projekciis kolorajn lumbildojn. La fotoj estis faritaj de li en Islando, Finnlando kaj Svislando dum la okazintaj en tiuj landoj universalaj kongresoj de Esperanto.

La E-veterano k-do Kostadinov rakontis rememorojn pri sia ĵurnalista laboro, parolis pri la profesia etiko de la korespondanto-esperantisto.

La kurso de ĵurnalistiko pasis sukcese kaj ni esperas, ke la bonaj rezultoj ne malfruiĝos — baldaŭ sin anoncos novaj kunlaborantoj al niaj E-gazetoj.

JORDANKA TODOROVA

# Utila kaj necesa kunlaborado

Esperantistaj kaj turistaj societoj kaj sekcioj ofte efektivas fruktodonan kunlaboradon. Oni aranĝas kune ekskursojn, feriadojn, vojaĝojn k.a. Tamen tio ne estas konstanta kaj sistema agado kaj ĝi ne estis ĝis nun instigata de la Bulgara Turista Asocio. Por atingi rekonon kaj subtenon flanke de tiu ĉi tre grava kaj amasa organizaĵo (ĝi havas pli ol du milionojn da membroj), vige ekagis la Turista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio. Rezulte de tiuj klopodoj estis subskribitaj protokolo kaj anekso al ĝi. Tiujn dokumentojn subskribis Hristo Gorov, prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio kaj Al. Petrov, unua vicprezidanto de Bulgara Turista Asocio.

En la protokolo estas dirite, ke ambaŭ asocioj kunlaboros por aktivigo de la turismaj manifestadoj inter esperantistoj kaj por popularigo de la avantaĝoj, kiujn donas la ellernado kaj praktikado de Esperanto tiurilate.

Oni planas eldonadon de broŝuroj en Esperanto pri la aktivecoj de la Turista Asocio kaj de informa bulteno „Turismo-Feriado“ kvarfoje en la jaro. Por popularigo de bulgaraj turistaj kantoj inter la esperantistoj en 1985 estos eldonita turista kantaro.

La turista vojaĝoficejo „Pirin“ devas konatigi kun la sperto de la vojaĝoficejoj „Express“ (Budapeŝto), „Juventur“ kaj Esperantotur“ (Bidgoszcz, Pollando), koncerne la utiligon de Esperanto en la internacia turismo. Krome ĝi devas komisi al ili la organizadon de esperantistaj turistaj grupoj. Por altiri klientojn inter la esperantistoj, vojaĝoficejo „Pirin“ devas eldonadi siajn presaĵojn ankaŭ en Esperanto.

Bulgara Turista Asocio aktive helpas la kampanjojn „Esperanto en la Internacia Danuba Regatto“. Estis decidite eldoni komunan alvokon al la partoprenantoj en la regatto (en la lingvoj parolataj en la apuddanubaj landoj) por atentigi ilin pri la ebleco de facila kaj efika interkompreniĝo pere de Esperanto de la diversnaciaj partoprenantoj en la regatto. Estas antaŭvidita ankaŭ eldonado de materialoj por popularigo inter esperantistoj de la regatto, kiu en 1985 estos organizita jam por 30-a fojo.

La atingitaj sukcesoj estos la reala kontribuo de la bulgaraj esperantistoj-turistoj al la komuna aktivado de BEA lige kun la 100-jariĝo de Esperanto.

**NIKOLA NIKOLOV,**  
vicprezidanto de Monda Turismo

## Tradukistoj en Esperanto

La 17—23-an de aŭgusto 1984 en Vieno okazis Kongreso de la Internacia Federacio de Tradukistoj

La kvalito de tradukverkoj kaj la tradukarto ĝenerale koncernas ankaŭ la internacian lingvon Esperanto. Lige kun tiuj problemoj pasintjare CE de BEA okazigis seminarion kaj lastprintempe — kurson por esperantistoj el la tuta lando, kiuj bonege regas la lingvon, kiuj montris emon kaj intereson al la traduklaboro.

La okazinta en Vieno internacia kongreso de tradukistoj estigis motivo por amika kaj sincera, sed samtempe tre utila interpalolo kun k-do Violin Oljanov, kiu gvidas la traduklaboron. Li memorigis, ke jam en la unuaj jaroj de disvastiĝo de Esperanto en nia lando aperis ankaŭ tradukistoj, kiuj komencis popularigi la bulgaran literaturon per Esperanto. Verkoj de klasikuloj kaj de nuntempaj aŭtoroj estas tradukitaj kaj disvastigataj tra la tuta mondo. Malnovaj tradukistoj popularigis en Eŭropo, Azio, Latina Ameriko kaj Aŭstralio niajn verkistojn Ivan Vazov, Hristo Botev, Hristo Smirnenki, Geo Milev, N. J. Vapcarov, Georgi Karaslavov k.a. Interesa estas la konstato

de akademiano G. Karaslavov, ke la traduko de verkoj el la bulgara literaturo en ĉinan lingvon el iliaj Esperantaj tradukoj estas multe pli proksima al la bulgara originalo ol tiuj faritaj el la anglalingvaj tradukoj.

„En la pasinteco, diris Oljanov, kun tiu respondeca laboro okupiĝis entuziasmojloj esperantistoj, sed pli malpli neorganizite, nesisteme. Nun la Bulgara Esperantista Asocio sisteme planas tradukojn de broŝuroj, bultenoj kaj libroj de diversaj aŭtoroj. Sed la ekzistanta malnova grupo de tradukistoj jam preskaŭ ne ekzistas. La bezono de novaj tradukistoj naskis la ideon pri organizo de diversaj formoj por preparo de tradukantoj.

„Alia formo de agado en tiu direkto estas la Tutlanda Amika Rondo de Tradukemuloj ĉe la Filologia Sekcio. Tio estas speco de koresponda kurso, kiu konsistas nur el tradukoj. La intereso al ĝi estas konsiderinda, al ĝi konstante aliĝas novaj samideanoj.“

K-do Oljanov esprimas sian optimismon, ĉar la unuaj malfacilaĵoj jam estas en la pasinteco. Kreiĝas la necesaj kondiĉoj, por ke la Esperanto-traduko atingu altan kvaliton.

**D. MUTUŠEV**



MIRIAM WADDINGTON

## PRINEGAJ RAKONTOJ

Kiam estis mi infano,  
mi tre ŝatis aŭskultadi  
neĝrakontojn:  
kiel vojaĝantoj perdis  
sian vojon  
kaj kiel, varmigiĝinte post frostiĝo,  
endormiĝis  
en la neĝo  
kaj neniam plu vekigiĝis.

Aŭ, aliaj vojaĝantoj  
estis luppelitaj  
en decembra neĝa nokto,  
la blizard' blindigis ilin  
kaj la lupoj hurlis,  
tial ili perdis sian vojon  
kaj neniam  
ĝin retrovis.

Tiun ĉi Kristnaskon  
la prineĝrakonto  
estas preskaŭ tiu sama:  
ni vojaĝas  
kaj ni perdas nian vojon,  
endormiĝas  
kaj vekigi ni ne povas,  
ni troviĝas  
sub la sorĉo  
de l'mensogoj de la vintro.  
Ni permesis  
al la lupoj de Ĉilio  
per ululoj nin deigi de la vojo,  
ni daŭrigas dormi  
kaj ne haltas por aliaj vojaĝantoj,  
ja la lumo, vundas al ni la okulojn  
kaj la ver' al ni kapojn  
dolorigas.

La petrolaj potenculoj,  
la magnatoj de la gudro,  
la ministroj de la sablo kaj  
ĉiuj prezidentoj  
de l'malbono  
nin amuzas ĉiun nokton  
per la televido;  
sed ni estas plue  
ensorĉitaj

de l'prineĝrakontoj  
de la infaneco  
kaj fidemaj al la falsaj gestoj  
de l'poet' fremdlanda  
kaj neniuj plu parolas  
kun najbaroj sia  
kaj la koro de la mondo  
estas morna kaj malvarma  
La fajrejo de la mondo  
estas jam malluma kaj malvarma  
kaj nenia fajro povas ekvarmigi  
tiun ĉi Kristnaskon.

## KIEL MI PASIGIS LA JARON, AŬSKULTANTE LA NOVAJOJN JE LA DEKA HORO

La pasintan jaron  
estis ekzekutoj  
en Ĉilio,  
subaĉetoj en la amerikaj landoj,  
malpermeso de transito  
al hebreoj  
en Aŭstrio  
kaj mensogoj  
kaj mensogoj ĉie

La infanoj  
de Irlando  
ankaŭ estas menciataj  
en la novaĵaro,  
ili iĝis  
hardiĝintaj  
strataj batalantoj,  
iuj — eĉ murdistoj  
kaj mi demandadas min:  
kie ĉio ĉi finiĝos?

Kompreneble,  
la interesoj de l'statoj de Kanado  
(legu: la korporacioj)  
devas esti protektitaj  
ĉiupreze  
kaj ne gravas  
kiom multaj bonaj homoj  
estas mortpafataj  
kiel hundoj  
sur la stratoj de Ĉilio, aŭ  
kiom multe da poetoj  
mortas pro rompitaĵoj koroj.

Oni diras,  
ke la mond' sangiĝas  
al plibonigado  
kaj ke pruve oni havas  
hompromenon  
sur la luno.  
Tamen mia koro krevas,  
mia intestar' tordiĝas.  
Ja multegon havas mi por diri —  
dank' al Dio  
mi maljuna estas  
por naskado de infanoj. En la angla: D. Haĝiev

# KIEL ONI ORGANIZIS LA HELPADON DE TRIFON ĤRISTOVSKI

Estas konata al ni la denaska sanstato de nia bonega kamarado kaj esperantista publicisto Trifon N. Ĥristovski. La konstantaj persekutoj fare de la faŝista polico kaj la ĉiama malriĉeco des pli malbonigadis liajn sanon kaj kapablon skribi, moviĝi. Tial ni decidis organizi en la tuta lando kolektadon de mono kaj medikamentoj, de bonkvalita kaj necesa por li nutraĵo.

Per kelkaj leteroj mi sciigis tion al Ĥristovski. Kvankam tro modesta, li konsentis pri tio kun kontenteco. Unue mi turnis min per apelo al la landaj esperantistoj, al la E-aktivuloj kaj societaj estraroj. Iuj el la esperantistoj memvole kaj meminiciate faris tion jam delonge. Iamanie apogis Ĥristovski ankaŭ elstaraj bulgaraj partiaj aktivuloj kaj gvidantoj kiel Georgi Bakalov, Todor Pavlov, Todor Samodumov k. a.

La kolektado de mono komenciĝis bone. Ĝi estis necesa al Ĥristovski ankaŭ por iuj riparoj kaj alkonstruoj de liaj domo kaj ĉambro — por konstrumaterialoj, laboristoj k.a. Konstantaj liaj helpantoj, kompreneble, estis liaj hejmanoj kaj parencoj, lia frato Boris. Krome, lin vizitis kaj helpis plejparte la esperantista junularo el la najbaraj de Radotina vilaĝoj — Lipnica, Litakovo k.a., kiu ofte gastis al li, konsiliĝis kun li. Al li gastis ankaŭ G. Antov, P. Bakarĝiev kaj foje inkognite ankaŭ mi, kio treege ĝojigis lin. Ni propraokule konvinkiĝis en kia mizera malriĉeco li vivas kaj kio estas necesa al li. Per letero de 24. 8. 1940 mi informis Trifon: „... Ni jam ekagis por kolekti ion por vi inter la esperantistaro — vi legis tion en la paĝo“ (E-paĝo en gazeto „Zarja“). En la sama letero mi petis lin: „... S-no Ĥristovski, vi devas konstante labori kaj kunlabori al la paĝo en „Zarja“ kaj al „Bulgara Esperantisto“.

Ni subtenadis Trifon Ĥristovski ankaŭ morale. Ni kuraĝigadis lin elteni la malfacilaĵojn, kiuj ofte ĝenis lin.

Treege malboniĝis lia animstato kaj memsento tuj post la komenco de la barbara invado de la

hitler-faŝistaj trupoj en Sovetunion. Tiam ni komencis skribi al li kuraĝigajn leterojn, ke venkos nepre Sovetunio, ke tuj post la venko ni ekzorgos pri lia sano kaj kuracado.

La amikoj kaj samideanoj de Ĥristovski malavare subtenadis lin. Mi mem abonis por li E-gazetojn, sendadis al li monon, medikamentojn, nutraĵojn, malgraŭ ke mia komiza salajro estis malgranda kaj 40% de ĝi mi donis por lupago por mia subtegmenta malvarma loĝejo. Ni sukcesis aranĝi kuracadon de Ĥristovski dum 2—3 monatoj en Sofia malsanulejo kaj ni regule vizitadis lin tie.

La libroj verkitaj de Ĥristovski (pri Ĥristo Botev kaj pri la problemoj de la bulgaraj vilaĝanoj) ne alportis al la aŭtoro monon, ĉar la polico konfiskadis kaj neniigadis la poŝtpakaĵojn.

Kiam la brava soveta armeo komencis disbati la hitlerajn bandaĉojn, Ĥristovski trankviliĝis kaj ekĝojis. Mi sendadis al li kuraĝigajn leterojn, skribante, ke post la definitiva venko super la faŝismo ni sendos lin en malsanulejon por kuracado. Bedaŭrinde, tio ne okazis, ĉar post la glora venko, apenaŭ fininte sian aŭtobiografion, li mortis en 1944.

Mi sukcesis kaŝi kaj konservi miajn kaj liajn personajn leterojn kaj liajn fotojn ĝis la tago de liberiĝo — 9-a de septembro 1944. En 1944 mi petis lin, ke per apartaj pakaĵoj li sendu al mi sian tutan arkivon, por ke mi kaŝu ĝin. Kaj li mem komencis, sed nur dufoje mi ricevis pakaĵojn de li. Baldaŭ post tio lia vivo estingiĝis. . .

Li tamen plu vivas en nia memoro per siaj verkoj, per sia aŭtobiografia libro „Mia vivo“, kiun ni, liaj amikoj, eldonis post la venka 9-a de Septembro 1944 bulgarlingve kaj antaŭ ne longe — ankaŭ en Esperanto. La filmo, dediĉita al lia vivo kaj faro, kiun oni nun preparas, lasos profundan spuron en la animoj de la estontaj bulgaraj E-generacioj.

IVAN ESPEROV



# BULGARAJ ESPERANTISTOJ PEREINTAJ EN LA KONTRAŬFAŜISMA BATALO

(Daŭrigo de n-ro 12/1984)

## SLIVEN

192. DEMIR SLAVOV — nask. 26. 04. 1911 en v. Krušare. Loĝis en u. Sliven. Suisto. Membro de DK de RMS. Suferis trijaran malliberon. Sekretario de DK de BKP (1941). Mortkondamnita kaj pendigita en la malliberejo en Sliven (8. 06. 1942).

## SMOLJAN

193. KOSTA AVRAMKOV — nask. 3. 06. 1911 en u. Smoljan. Laboristo. Membro de RMS. Persekutata pro revolucia agado en la kazerno. Elmigris en Sovet-Union. Partoprenis la Internaciajn Brigadojn en Hispanio kaj pereis en la batalo.

## SOFIO

194. LJUBOMIR ZAFIROV HAGIMIHAJLOV — nask. 1. 01. 1905 en u. Kjustendil. En sia naskiĝurbo li gvidis la lĉkan organizaĵon de BKMS. Poste transloĝiĝis en Sofion. Kunlaboranto de la Centra Komitato de BKP. Partoprenis la preparon de la Septembra Kontraŭfaŝisma Ribelo en 1923. Elmigris en Jugoslavion, sed baldaŭ revenis kaj plenumis gravajn taskojn. Arestita, kruele torturata kaj mortigita en la policejo en Sofio (aprilo 1925).

195. GEORGI SAJTANOV — nask. 14. 02. 1886 en u. Jambol. Ĵurnalisto. Anarhisto. Pro politika persekutado elmigris en Rusion. Partoprenis la Oktobran Revolucion en Rusio. Revenis la patrujon en 1918. Post la Septembra Kontraŭfaŝisma Ribelo en 1923 organizis armitan politikan trupon en Balkanmontaro proksime al u. Kilifarevo, kiu agis ĝis la printempo de 1925. Kaptita pro perfido, li estis mortigita kune kun aliaj arestitoj proksime al la stacidomo de Belovo (28. 05. 1925).

196. NIKONA KOFARGIEV — nask. 28. 04. 1908 en u. Burgas. Loĝis en Sofio. Partoprenis la prerapon de la Septembra Kontraŭfaŝisma Ribelo en u. Pernik. Sukcesis fuĝi al la juĝelo en Sofio kaj elmigris en Sovet-Union. Reveninte en Bulgarian, malleale estis sekretario de la Centra Komitato de BKMS (1926—1928) kaj de la Centra Komitato de BKP (1930—1931). Verkis multajn artikolojn kaj kelkajn broŝurojn. Mortpafita sur la straton en Sofio (30. 10. 1931).

197. SIMEON KAVRAKIROV — nask. 16. 11. 1898 en u. Thessaloniki (Greklando). Loĝis en Sofio. Operhoristo. Funkciulo de BKP. Elstara gvidanto de la Interna Makedona Revolucia Organizaĵo. Kaptita de faŝista bando, turmentita dum du jaroj tra Pirinmontaro. Mortigita apud u. Belica, distrikto de Blagoevgrad (14. 06. 1934).

198. KOSTA PENEV — nask. 06. 01. 1912 en v. Patriarh Evtimovo, distrikto de Plovdiv. Loĝis en Plovdiv, poste en Sofio. Kudristo. Sekretario de DK de RMS en Sofio. Kiel soldato gvidis viglan komunistan propagandon en la kazerno. Ĉe provo por aresto li eskapis. Mortkondamnita foreste. Li elmigris en Sovet-Union. Partoprenis la Internaciajn Brigadojn en Hispanio, pereis dum la bataloj apud Madrid (17. 02. 1937).

199. GEORGI PETKOV GOSEV — nask. 6. 04. 1912 en v. Pravec. Instruisto. Membro de BKP. Estris batalgrupon, helpis al la partizanoj. Post kruela turmentado en la policejo mortpafita kune kun granda grupo de arestitoj en la pasejo Arabakonak en Balkanmontaro (31. 12. 1943).

200. ALEKSANDAR SIMEONOV SPASOV — nask. 8. 03. 1905 en u. Etropole. Carpentisto. Membro de RK de BKP. Partizanhelpano. Mortpafita kun aliaj arestitoj en la pasejo Arabakonak en Balkanmontaro (31. 12. 1943).

201. GANKA RAŜKOVA — nask. 12. 10. 1921 en v. Balvan, distrikto de V. Tarnovo. Loĝis en Sofio. Poŝtoficiŝtino. Membro de RMS. Estris batalgrupojn. Pereis dum surstrata interpafado kun la polico en Sofio (27. 03. 1944).

202. DEĈO STEFANOV — nask. 1. 07. 1915 en u. Ŝumen. Membro de DK de BKP en u. Targoviŝte (1937—1939). Membro de DK de RMS en Sofio kaj de la stabo de partizantaĉmento „Ĉavdar“. Pereis en la batalo en v. Ĉavdarci (13. 04. 1944).

203. DIMITAR VIDELOV — nask. 16. 02. 1921 en v. Vojsil, distrikto de Plovdiv. Loĝis en Sofio. Senpartiuo. Kiel soldato aliĝis al la soldata partizana taĉmento „Hristo Botev“. Pereis apud v. Gorno Kâlmeno (Jugoslavio) (5. 05. 1944).

204. ALEKSANDAR PAŜEV — nask. 19. 04. 1908 en u. Pleven. Depost 1932 loĝis en Sofio. Presisto. Membro de BKP. Redaktis la profesion gazeton „Grafik“, kontribuis ankaŭ al gazeto „Literaturen glas“ kaj al ĵurnalo „Zarja“. La 12-an de majo 1944 aliĝis al partizantaĉmento „Georgi Benkovski“. Pereis en batalo apud v. Brusen (26. 06. 1944).

205. FILIP DILOV KRÂSTEV — nask. 16. 08. 1912 en v. Novaĉene. Sekretario de RMS en sia naskiĝvilaĝo, membro de DK de RMS. Suferis malliberejon. Partizano en brigado „Ĉavdar“. Pereis en batalo apud v. Brusen (26. 06. 1944).

## STARA ZAGORA

206. NAĈO IVANOV LAZAROV — nask. en v. Otec Paisievo, distrikto de Plovdiv. Loĝis en u. Kazanlâk. Laboristo. Sekretario de RK de BKP. Mortkondamnita foreste. Elmigris en Greklandon, sed estis alkondukita reen. Pendigita en la malliberejo en u. Plovdiv (14. 11. 1934).

207. STOJAN BENEV — nask. en 1914 en u. Stara Zagora. Lernanto. Pro komunisto agado eksigita el la gimnazio. Sekretario de RK de RMS. En 1935 elmigris en Sovet-Union. Mortis en 1939.

208. VLADIMIR GERGIKOV — nask. 14. 11. 1914 en u. Vidin. Loĝis en u. Stara Zagora. Eksigita pro komunisto agado el la gimnazio en lia naskiĝurbo, finis siajn studojn en la gimnazio en u. Asenovgrad. Membro de DK de RMS en u. Plovdiv. Pro politika persekutado elmigris en Sovet-Union. Mortis la 19-an de decembro 1943.

209. PETAR SREBROV JOVĈEV — nask. 27. 06. 1910 en u. Ĉirpan. Membro de DK de RMS en Plovdiv. Studis medicinon en Ĉeĥoslovakio. Aktivis en la revolucia movado en tiu lando. Arestita la 14-an de decembro 1944, mortigita en koncentrejo (25. 4. 1945).

## TÂRGOVIŜTE

210. MARA TASEVA — nask. 13. 11. 1900 en u. Popovo. Tekslaboristino. Suferis malliberigon en daŭro de tri jaroj. Sekretario de RK de BKP. Mortkondamnita kaj pendigita en la malliberejo de u. Ŝumen (14. 08. 1942).

211. ANKA KAMBUROVA — nask. 20. 05. 1920 en v. Kamburovo. Membro de DK de RMS. Aliĝis al partizana taĉmento, kies politikmisaro estis lia patro. Pereis en batalo apud v. Kalniŝte (29. 01. 1944).

## VARNA

212. GEORGI ANDONOV GRIGOROV — nask. 22. 09. 1919 en u. Blagoevgrad. Loĝis en u. Varna. Sekretario de RK de RMS, membro de DK de BKP. Estris batalgrupon. Mortkondamnita kaj pendigita en la Centra Malliberejo en Sofio (25. 06. 1942).

213. MOIS JOSIF LEVI — nask. 13. 06. 1914 en u. Provadija. Loĝis en u. Varna. Laboristo. Membro de RK de BKP. Helpis al la batalgrupoj en la urbo. Mortigita en la polico en u. Provadija. (3. 03. 1943).

#### VELIKO TĀRNOVO

214. MARIOLA SIRAKOVA — nask. 25. 05. 1904 en u. Kilifarevo. Anarkistino. Partoprenis la antifasisman ribelen je la 9-a de junio 1923. Aliĝis al politika armita trupo, aganta en Balkanmontaro (1924—1925). Kapitita kaj mortpafita kune kun granda grupo de arestitoj proksime al la stacidomo de u. Belovo (28. 05. 1925).

215. DIMITĀR MATROV — nask. 29. 01. 1903 en u. Ljaskovec. Carpentisto. Anarkisto. Kiel soldato fuĝis el la kazerno kaj fariĝis mallegala. Mortigita en la kazerno de u. V. TĀrnovo kune kun aliaj arestitoj (majo 1925).

216. GEORGI HRISTOV PĀRGOV — nask. 22. 04. 1903 en u. Ljaskovec. Anarkisto. Mortigita en la kazerno de u. V. TĀrnovo kune kun aliaj arestitoj (majo 1925).

217. IVAN TOPALOV — nask. 22. 11. 1900 en u. Ljaskovec. Teknikisto. Anarkisto. Mortigita en la kazerno de u. V. TĀrnovo kune kun aliaj arestitoj (majo 1925).

218. KOSTA STEFANOV KAZANGIEV — nask. 10. 10. 1901 en u. Ljaskovec. Anarkisto. Mortigita en la kazerno de u. V. TĀrnovo kune kun aliaj arestitoj (majo 1925).

219. PENJU ENĈEV DRAGANOV — nask. 27. 01. 1902 en u. Ljaskovec. Anarkisto. Mortigita en la kazerno de u. V. TĀrnovo kune kun aliaj arestitoj (majo 1925).

220. DIMITĀR DJULGEROV — nask. 1. 11. 1919 en u. Dolna Orjaĥovica. Sekretario de DK de RMS. Suferis malliberejon (1934—1937). Sekretario de OK de BKP. Komandanto de partizana taĉmento. Pereis apud u. Debeleč (27. 11. 1943).

221. MARIN DIMITROV GRIGOROV — nask. 20. 04. 1917 en v. Gorski Senovec. Sekretario de la loka organizado de RMS. Suferis malliberejon. Partizano. Pereis en batalo en la arbaro apud u. Strajica (28. 05. 1944).

222. GEORGI AVRAMOV SĀBEV — nask. en u. Dolna Orjaĥovica. Membro de RMS. Partizano. Mortpafita en la arbaro apud u. Strajica (05. 06. 1944).

223. DIMITĀR TRIFONOV GENKOV — nask. 26. 10. 1918 en v. Polikraište. Juristo. Membro de RK de RMS. Politikomisar de partizana trupo. Pereis en batalo apud v. Haĝidimitrovo (7. 06. 1944).

224. TODOR MOLLOV — nask. 23. 11. 1918 en u. Dolna Orjaĥovica. Kudristo. Membro de DK de RMS. Komandanto de partizana trupo. Pereis en batalo apud v. Pavel (7. 07. 1944).

#### VIDIN

225. BOJAN ĈONOS — nask. 3. 05. 1921 en u. Vidin. La infanecon pasigis en Sovet-Unio, kie lia patro estis politelmigrinto. La patrujon revenis en 1931. Sekretario de DK de RMS. Vicpolitikomisar de partizana taĉmento „Georgi Benkovski“. Kapitita kaj pendigita en la malliberejo en Vidin (13. 10. 1943).

#### VRACA

226. VASIL VODENICARSKI — nask. 12. 01. 1918 en v. Ĥajredin. Verkisto kaj publicisto. Membro de BKP kaj BONSS. Suferis koncentrejon (1941—1943). Partizano en taĉmento „Gavril Genov“. Pereis en batalo apud v. Lipnica (28. 04. 1944).

227. JORDAN KAMENOPOLSKI — nask. 14. 10. 1919 en v. Kameno Pole. Membro de RMS. Politmallibero. Helpanto de la partizanoj. Mortigita apud v. Suĥaĉe (7. 06. 1944).

## JAPANIO — MALPROKSIMA KAJ PROKSIMA

(Daŭrigo de n-ro 12/1984)

NHK (No Ho Ko) estas la plej granda televida korporacio en Japanio. Fraŭlino Senjo Umeda afable promenis min tra la etaĝaj labirintoj de la firmao. Mi haltas antaŭ unu el la surbendigaj ĉambroj. La vizitantoj povas senpere spekti la provludojn de iuj el la spektakloj — nur vitra barilo disigas ilin de la aktoroj. En alia loko la vizitantoj povas libere paroli kaj en la sama momento observi sin sur la ekrano. La kameraoj estas aŭtomataj. Estas ekspoziciitaj multaj aparatoj kun diversa destino. Elektronika panelo registras la eniron de ĉiu vizitanto per laŭvica numero. Bedaŭrinde, mi ne memoras mian numeron.

Kvartalo Akihabara. Oceano el elektronikaj fabrikoj — vitrinoj kaj standoj plenplenaj de televidaparatoj, magnetofonoj, kalkuliloj kaj multaj aliaj varoj, kiuj per sia eleganta aspekto allogas acetantojn, turistojn kaj gapulojn. Ĉi tie estas siaspeca areno de negoco — ĉiu vendisto strebas allogi klientojn en sian magazenen.

La varmego (30°C) kaj la granda humideco daŭre turmentas min. La refreŝigaj magazenoj kaj la veturiloj estas vera oazo ne nur por mi, sed ankaŭ por la japanoj mem. Julio kaj aŭgusto estas la plej netolereblaj monatoj en Japanio.

Post la admirinda promenado en Akihabara mi renkontiĝis denove kun fraŭlino Senjo Umeda en koketa kafejo. Ni mendas sandviĉojn kaj specon de glaciaĵoj (kooi i ĉi go), similaj al glaciiginta siropo. La lastajn oni prezentas en grandaj glasoj, ili havas la formon de glacietoj, kolorigitaj per mirinde belaj farboj, depende de la frukto, el kiu ili estas faritaj. Tiuj glaciigitaj siropoj estas tipaj por Japanio kaj la japanoj preferas ilin dum la varmaj someraj tagoj.



En la domo de Keiko Suzuki

La saman vesperon mi partoprenis kunvenon de la grupo „Sekso kaj egaleco“ kaj aliaj grupoj. La salono pleniĝas de esperantistoj kaj neesperantistoj — viroj kaj virinoj. Ĉi tie troviĝas ankaŭ la gastoj por la jubilea kongreso de la japanaj esperantistoj, nome el Nov-Zelando kaj Suda Koreujo. La ĉeestantoj atente aŭskultas mian prelegon pri laborantaj bulgarinoj. Pri la montrita intereso elokvente atestas la dekoj da demandoj. Mi ne havas eblecon menciigi ĉiujn, sed jen kelkaj, kiujn mi ne povas preterlasi: Ĉu dudek procentoj da nelaborantaj virinoj riproĉas la okdek procentojn da laborantinoj? Kiu estas la preferata profesio? Ĉu ni festas oficiale la 8-an de Marto — la internacia tago de virinoj? Ĉu en nia lando estas senlaboruloj? Kiu anstataŭas la virinon-patrinon, se ŝi estas respondeca gvidantino? Ĉu la bulgarinoj fumas? Ĉu la ŝtato protektas la multinfanecon? Kiaj estas la interesoj de la junularo, de la studentoj? Mi respondas plezure al la starigitaj demandoj. Tiu kunveno ege impresas, min, same kiel la kunveno en Jokohamo. Ĝi montras la aktivigon de la japanaj virinoj, batalantaj por emancipiĝo. Cetere, jam multaj el la junaj japanaj viroj havas modernajn vivkonceptojn kaj energie subtenas la realajn strebojn de la virinoj. Du kvinonoj el la laborforto en Japanio estas virinoj, kiuj estas pli malalte pagataj ol la viroj por egalaj profesiaj okupoj. Malgraŭ sia profesia okupiteco, la japaninoj en sia hejmo estas mildaj kaj zorgemaj patrinoj, atentemaj kaj ĉarmaj edzinoj, bonegaj dommastrinoj.

La japaninoj kaj la japanoj vestas sin modeste malgraŭ ke la magazenoj estas plenplenaj de modernaj kaj belaj vestaĵoj kaj ŝuoj. Mi preskaŭ ne vidis ŝminkitajn knabinojn kaj virinojn. Mi ne rimarkis japaninojn en ŝuoj kun tre alta kalkanumo. Generale, la ekstravaganco estas fremda al ili.

Kvinan de aŭgusto. Hodiaŭ mi forveturas kun grupo da junaj geesperantistoj el Tokio al la kongresa urbo Kameoka. Antaŭ la forveturo s-ino Vasio Eiko petas min legi la libron por komencantaj esperantistoj „La teksto unua“, por surbendigi ĝin. Mi plenumas volonte ŝian peton. Si gvidas kurson de Esperanto kaj tiu surbendigo estos ŝia bona instruhelpilo. Multaj el la japanoj opinias, ke ili ne prononcas sufiĉe belsone Esperanton. Tamen mi ne konsentas plene kun ili. Ilia fabela modesteco, kiu treege ornamas ilin kaj igas min sincere admiri ilin, ne permesas al ili sufiĉe alte taksi siajn bonegajn lingvistojn-esperantistojn — Krizantemo, Jamakava, Osioka, Fuĝimoto, Morita, Niva Masahisa, Kurita, Nanba, Nisida ka.

La vojo de Tokio al Kameoka estas longa, sed sendube tre interesa por mi. Mi ekveturas per mikrobuso, trapasas sennombrajn stratojn kaj fine atingas la aŭtostraton. (Miaj kunvojaĝantoj informas min, ke en Japanio, krom la ŝtataj, estas ankaŭ privataj aŭtostratoj kaj fervojoj. Kiel en la plimulto da eŭropaj landoj, ankaŭ tie ĉi oni



Kun lernantinoj en Friska lernejo

pagas takson por uzi la privatajn aŭtostratojn). Mi ĝuas la pretervojan pejzaĝon kaj vigle partoprenas la interparolon. Mia atento estas altirita de dekoj da plantejoj de verda teo. La plantoj estas malaltaj arbustoj, zorgeme vicigitaj en bele aranĝitaj bedoj.

Vespere ni haltas apud la lago Hamana. La pejzaĝo estas vere ĉarma. Sur la arĝenta akvo navigas diverskoloraj boatoj, jahtoj. Inter du vertikalaj rokoj la akvoj de la lago mistere sin traŝovas kaj formas kanalon. Super ĝi la eltrovemaj japanoj estas konstruintaj lifton por turistoj. Ni vespermanĝas en la proksima restoracio. En vitrino estas montritaj ĉiuj manĝaĵoj, kiujn proponas la restoracio. Mi mendas „Hanbagu-steki“ — ĝi prezentas grandan farĉbuleton kun garnaĵo el brasikpecetoj, tomato kaj iom da makaronioj. Iuj el miaj kunvojaĝantoj mendas por si „misoŝiru“ — tipa japana supo el algoj, ajlo kaj io alia.

Malfrue vespere ni atingas Kameoka. Ni haltas antaŭ la kongresa komuna loĝejo, propraĵo de „Oomoto“. La respondeculoj de la Loka Kongresa Komitato estas sur sia posteno. Oni disdonas al ni la paperujojn kun kongresaj materialoj kaj suveniroj, post kio oni montras al ni la ĉambrojn. Mia ĉambro troviĝas sur la tria etaĝo. En ĝi estas tre malmultaj mebloj, ĝi estas preskaŭ nuda — tatama planko, glitpordoj, ŝrankoj en la muro, kie troviĝas la matracoj, dormokovriloj, kusenoj, littukoj. En la mezo — malgranda ligna tabuleto. Ĉio estas simpla, sen nenecesaj objektoj kaj samtempe komforta. Ne mankas ankaŭ vazo kun floroj, metita en malgrandan niĉon en unu el la plej helaj anguloj de la ĉambro. En iuj japanaj domoj en tiu siaspeca altaro de la beleco la vazo estas kovrita per vitra kovroplato. Super ĝi sur la muro pendas „tokonama“ — kaligrafie skribita versaĵo aŭ originala bildo.

(daŭrigota)

VASJA CVETKOVA



## „NOVA MINACO AL EŬROPO: KIU KULPAS?“

Agentejo „Novosti“ jam eldonis vicon da broŝuroj en Esperanto pri tre gravaj temoj. Unu el la plej interesaj estas la menciita en la titolo de tiu ĉi recenzo. Oni devas saluti la eldonejon pro la aperigo de tiu tre dokumentita broŝuro, ĉar ankaŭ inter la esperantistoj troviĝas apartaj personoj aŭ eĉ organizaĵoj, kiuj ne havas ĝustan ideon pri la porpaca politiko de Sovetunio.

La broŝuro donas klarajn respondojn al ĉiuj falsaj tezoj kaj kalumniuj misprezentoj fare de NATO-landoj, frunte kun USONO, pri la pacproponoj de Sovetunio en Genevaj intertraktadoj. La vero konsistas en tio, ke Sovetunio strebas sincere kaj sisteme al plena liberigo de Eŭropo de nuklea armilaro aŭ, se oni ne akceptos radikalan solvon de la problemoj pri forigo de la militminaco, almenaŭ al ĝia serioza limigo surbaze de ambaŭflanka reciproke akceptebla interkonsento pri egaleco kaj sekureco. La poli-

tiko de USONO kaj NATO-landoj celas rompon de la kreiginta ekvilibro rilate la nuklean armilaron malfavore al Sovetunio, do al ĉiapreza milita dominado super USSR. Por kaŝi tiun celon la propagando de USONO kaj ĉiuj NATO-landoj kreas mitojn pri kvazaŭa „defenda politiko“ de USONO kontraŭ la „supereco“ de Sovetunio en la sfero de nuklea armilaro. Per similaj mensogaj asertoj oni pravigas la dislokadon de mezdistancaj usonaj nukleraketoj en Britio, FRG, Italio k.a. NATO-landoj. Kaj oni esperas konvinki la mondan kaj precipe la eŭropan publikan opinion englutiti tiujn elpensadojn, kvankam nome la dislokado de „eŭroraketoj“ fiaskigis la intertraktadojn en Genevo.

Vane la Blanka Domo en Vaŝingtono kalkulas, ke Usona unua nuklea frapo kontraŭ Sovetunio kaj ties aliancinojn el la Varsovia Kontrakto limigos la nuklean militon nur en Eŭropo kaj Usono restos flanke aŭ estos minimume tuŝita de la militkatastrofo.

Nature, la minaco al Eŭropo estas treege grava. Sed ankaŭ la usona popolo ne evitos la nuklean katastrofon. Kontraŭ la cinike proklamita de Usono unua frapo kontraŭ Sovetunio, ĉu la sovetia registaro kaj ties aliancinoj el Varsovia Kontrakto restos malkapablaj sin defendi? Neniu devas miri, ke la minacata flanko prenas logikajn kaj adekvatajn kontraŭrimedojn.

Ni rekomendas la broŝuron. Ĝin oni povas havigi petante la kancelaron de BEA aŭ skribante al: Izdatelstvo APN, USSR, 107082 Moskva, Bolŝaja Poĉtovaja 7.

**NIKOLA ALEKSIEV,**  
honora prezidanto de MEM

## tra la e-mondo

### SALUTOJ EL MADAGASKARO...

Nia peranto en Madagaskaro — Justin Randriamampionona (maldekstre sur la foto, staranta — kun la longtuba aŭtohtona muzikilo) kun la muzik-grupo „ESMAG“ (Esperantista Malagasa Grupo).

Li volonte korespondus kun esperantistoj, kiuj same kiel li muzikas (nacilingvaj kaj esperantaj kantoj, folklora muziko ktp.)

**Skribu laŭ adreso:**  
Justin Randriamampionona,  
Lot. V. C. 56 Faliarivo Ambanidia,  
101 Antananarivo  
Rep. Dem. Malagasy,  
Madagascar



Nia madagaskara amiko kaj peranto Justin Randriamampionona (unua maldekstre) kun sia muzikensemblo.



### ...KAJ EL VJETNAMIO

Kantensemblo de geesperantistoj el la kurso de k-dino Hoang Minh Phung (la unua dekstre).

Helpu nian novan rondon: TU MI, 31 Truong Dins — F11—QI, urbo Ho Chi Minh, Vjetnamio.

## ESPERANTO EN UNIVERSITATO

Trovinte utila kaj necesa la uzadon de diversaj lingvoj (angla, rusa, franca, germana) por disvastigi la rezultatojn de sciencoj kaj tekniko en la mondo, la universitato de Càn-Tho (Sudvjetnamio) bone utiligas ankaŭ Esperanton en pluraj medioj: medicina, agrikultura, scienca, kaj ankaŭ en sia duonmonata revuo.

Turnante sin al la 100-jara jubileo de Esperanto, la Universitato de Càn-Tho projektas — precipe por la universitata personaro, kiu jam posedas multajn lingvojn, fondi Esperantan klubon, celante pliprofundiĝi en la lernadon; propagandi per esperantaĵoj; prelegi pri la vivo de Zamenhof kaj pri la evoluo de Esperanto en la mondo; organizi Esperanto-kursojn; per Esperanto prezenti epitomon de l'Universitato aŭ multajn sukcesajn rezultatojn de studada programo, spertojn pri sciencoj kaj tekniko en diversaj fakoj; aperiĝi dupaĝan informilon pri Esperanto kaj studado (esperantlingve evidente). Ni jam disponas spacon por ricevi artikolojn (skribitaj en ĉiuj fremdlingvoj) alvenintajn el ĉiuj mondanguloj.

Freŝdate la Universitato estis organizita ekspozicion de Esperantaj libroj: unuafoje en la Universitato mem kaj duafoje en la Pedagogia Altlernejo.

La Universitato kreis en la Fakoj de Sciencoj kaj Tekniko Esperantajn kursojn rezervitajn por profesoroj kaj docentoj kaj jam eldonis poŝvortaron 'Esperanto-vjetnaman, entenantan 2000 vortojn.

La 15-an de julio 1984 okazis malfermo de la vespera centra kurso de fremdlingvoj: rusa, angla, franca, kampučia kaj Esperanto.

Do, la Universitato de Càn-Tho plene elmontras sian aktivecon kaj atendas helpon de ĉiuj frataj universitatoj.

Estas dezirinde, ke ankaŭ aliaj Esperantaj kluboj respondu al tiu alvoko, interŝanĝu esperantaĵojn pri scienco kaj tekniko kaj pri lernado kaj subtenu tian fratecon.

Adreso: **Universitato de Càn-Tho**  
**I strato TU'DU'C**  
**CÀN-THO, SUDVJETNAMIO**

**HOANG MINH PHUNG**

## PARTOPRENU EKSPOZICION!

La Komsomola Komitato, la Urba Komitato de la Veteranoj de la Milito kaj la Klubo de Internacia Amikeco en urbo Aluksne, Latva SSR, aranĝas ekspozicion omaĝe al la 40-a datreveno de la Venko super faŝismo. Ni petas ĉiujn esperantistojn kaj klubojn helpi al ni en la organizado de la ekspozicio.

Karaj partoprenontoj, bonvolu sendi diversajn materialojn: flagetojn kaj insignojn, turismajn prospektojn, bildkartojn k.a. Ni respondos al ĉiuj aparte kaj dankos speciale al la redakcioj de E-revuoj kaj esperantistaj kluboj, kiuj kontribuos. Limdato por sendado de materialoj: 20-a de aprilo 1985. Adreso 228730, Sovetunio, Latva SSR ALUKSNE, OMSKAS STR. 16—2, al Kovnators Naumo.

## JUBILEO DE KRAJNOV



Sergej Krajnov — 80-jaraĝa, honora membro de BEA, estrarano de ASE, dumviva membro de UEA, kune kun sia nepo Jurij — limgardisto. Ni kore gratulas la feliĉan jubileulon kaj bondeziras sanon kaj longjaran viglan poresperantan aktivadon!

## SENMORTAJ NOMOJ

Fine de novembro pasinjara en la klubejo de la subdistrikta komitato de Aktivaj Batalantoj kontraŭ Kapitalismo kaj Faŝismo (ABKF) en Sofia subdistrikto „Vasil Levski“ okazis renkontiĝo de la subdistrikta E-societo „Nikola Botuŝev“ kun veteranoj-kontraŭfaŝistoj, omaĝe al esperantistoj pereintaj en la batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo.

La Renkontiĝon malfermis Georgi Kovaĉki — prezidanto de la subdistrikta societo de ABKF. Per raporto sin prezentis la prezidanto de societo „Nikola Botuŝev“ — d-ro Marin Balĉev. Li parolis pri la kontraŭfaŝisma kaj esperanta agado de eminentaj funkciuloj de la laborista kaj komunista movado en nia lando — Nikola Vapcarov, Cvjatko Radojnov, Liljana Dimitrova, Vela Peeva ka.

La literatura-muzika programo, dediĉita al la 40-jara jubileo de la socialisma revolucio en Bulgario, estis preparita sub la gvidado de la konata kantistino Maria Angelova. La aktorino Angelina Sotirova tralegis biografian skizon pri Nikola Botuŝev. Lian lastan leteron al lia edzino tralegis Nevjana Krăsteva. La biografia skizo pri Cvjatko Radojnov kaj la poemo „Liljana“ de Blaga Dimitrova estis esprimo de poezia adorado al la memoro de la batalantoj-esperantistoj. La deklamantoj estis ĝejnuloj, ĝajnintaj la unuajn lokojn en la konkurso-recitalo de Botev-Poezio en Vraca. Per sia kortuŝa deklamado de versaĵo pri la paco la junpionirino D. Denĉeva prezentis la tutan purecon kaj kredon de la plej juna generacio avida pri trankvila kaj feliĉa vivo.

Intimecon al la atmosfero aldonis la rememoroj pri Nikola Botuŝev, Ivan Ĥristov, Deĉo Stefanov, kiujn rakontis Nikola Aleksiev — honora prezidanto de MEM, Ĥristo Gorov — prezidanto de BEA kaj Jeljazko Kolev el CK de BKP — eksa partizano el taĉmento „Ĉavdar“.

VERA RAJKOVSKA

## IMPULSO POR PLUA AKTIVA AGADO

(Kvina konferenco de la Poŝtista Sekcio ĉe BEA)

De la 2-a ĝis la 4-a de novembro 1984 en la Internacia E-Kursejo — Pisanica, okazis la V Konferenco de la Poŝtista Sekcio ĉe BEA, kiun partoprenis ĉirkaŭ 40 poŝtistoj-esperantistoj. Ĉeestis gastoj el Budapeŝto.

En la tagordo de la konferenco estis prezentitaj jenaj raportoj: Stato kaj taskoj de la Poŝtista Esperanto-Sekcio (Draguŝko Petrov, prezidanto de la Sekcio); Plej novaj atingoj en la sfero de telegrafaj komunikoj (supera scienca kunlaboranto kaj kandidato de la teknikaj sciencoj inĝ. Geor-

gi Stoilov); Evuluo de la komunikado en Bulgario ĝis la 2 000-a jaro (inĝ. Snejana Terzieva, ĉefspecialisto ĉe la Ministerio de Komunikado); Enkonduko de nova tekniko por mekanikigo kaj aŭtomatigo de la poŝtaj komunikoj (Paskal Pârvanov, specialisto ĉe la Sofiaj Poŝtaj Stacioj).

Ivan Slavov — specialisto el la distrikta poŝtofoicejo — Ruse, prelegis lige kun la 67-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio.

Salutojn de la hungaraj poŝtistoj-esperantistoj transdonis la kolego Karlo Fajŝzi el Budapeŝto.

La konferenco ebligis al la ĉeestantoj pli proksiman interkonatiĝon kaj donis impulson por plua aktiva E-agado.

DRAGUŜKO PETROV

## JUBILEA CELEBRADO

La 27-an de oktobro pasintjara en urbo Simeonovgrad esperantista societo „Trakia Lumo“ celebris sian 20-jaran ekzistadon. La solenaĵon partoprenis esperantistoj el la urboj Ĥaskovo, Dimitrovgrad, Ĝâlâbovo k.a. — entute 80 personoj.

La kunvenon gvidis Todor Kurtov — prezidanto de la societo. Raporton pri ĝia 20-jara agado prezentis Todorka Dobriŝinova — sekretariino-kasistino en la societa estraro. Poste grupo de junpioniroj-esperantistoj plenumis literaturan-muzikan programon.

Elkore salutis la partoprenantojn Maria Donĉeva — sekretiino de la komunuma komitato de la Bulgara Komunista Partio en Simeonovgrad, Nikola Pilev — prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA — Ĥaskovo, Kanjo Kanev — prezidanto de la E-societo en urbo Ĝâlâbovo, Ivan Dobrikov — prezidanto de la E-societo en Dimitrovgrad kaj Dimitâr Stoilov — prezidanto de la E-societo en urbo Ĥarmanli. Estis traigitaj salutleteroj de geamikoj el urbo Jaroslavl (Sovetunio), de grupo „Ujlaki“ el Budapeŝto (Hungario) kaj el Rostock (GDR).

Generaligis la eldirojn Dimitâr Mutuŝev — membro de la Buroo de BEA kaj ĝenerala direktoro de la Ekonomia Direkcio „Globo“.

Li distingis per oraj, arĝenaj kaj bronzaĵoj insignoj de BEA 13 aktivulojn de la societo.

Fine la partoprenantoj en la solena kunveno aprobis salutleterojn al la Centra Estraro de BEA kaj al la Nacia Komitato por Defendo de la Paco.

Post la solenaĵo estis organizita malgranda ekskurso al la proksima montodomo „Zornica“.

TODOR KURTEV

## GELERNANTOJ LERNOS ESPERANTON

La 21-an de oktobro 1984 gelerantoj el la klaso de la instruistino Todorka Tabakova (el lernejo „Vela Piskova“ — Veliko Târnovo) kunvenis en parko „Amikeco“, ĉe la tombo de sia patrono Hristo Kamburov. La memorkunveno ĉeestis la lerneja direktorino N. Aleksieva, la edzino de Hristo Kamburov — Roza Kamburova, gepatroj, reprezentanto de la Distrikta Komitato de BEA. La infanoj jam interesiĝis pri la partizana vivo de Hristo Kamburov, vizitis lian naskiĝvilaĝon Hotnica, prizorgadis lian tombon, aranĝis anguleton pri li en sia klasĉambro. Ili jam estas informitaj pri la internacia lingvo Esperanto kaj deziras lerni ĝin kiel la patrono de ilia junpionira taĉmento Hristo Kamburov. La direktorino volonte aprobis tiun ideon, des pli ke Vela Piskova — patrono de la lernejo, same estis esperantistino.

La junpioniroj el taĉmento „Hristo Kamburov“ intencas fari ekspozicion de infandeseĝnaĵoj. Do, ili senpacience atendas la kontribuojn de infantoj-esperantistoj el eksterlando. Bonvolu adresi viajn sendaĵojn al: BULGARIO, 5000 Veliko Târnovo, Lernejo, „Vela Piskova“ — por la Esperanto-ekspozicio.

OLGA CANKOVA



Gelernantoj el lernejo „Vela Piskova“ — Veliko Târnovo, ĉe la tombo de Hristo Kamburov.

Foto: Vasil Tabakov

## ESPERANTA KULTURCENTRO ANKAŬ EN RAZGRAD

La 16-an de novembro 1984 en urbo Razgrad estis solene inaŭgurita Esperanta Kulturcentro — dua en Bulgario post la Kulturcentro „M. Gorkij“ en Sofio.

La festan kunvenon ĉeestis sociagantoj el la urbo, lokaj esperantistoj kaj gastoj el aliaj urboj. Parolis la prezidanto de DE de BEA en Razgrad d-ro Ivan Kirĉev.

La Esperanta Kulturcentro en Razgrad estis kreita dank'al la sindona laboro de esperantistoj-entuziasmoj — veteranoj kaj gejunuloj.

Ni bondeziras utilan agadon al la nova Esperanta Kulturcentro!

STEFKA MARKOVA

## SOCIETO „MAKSIM GORKIJ“ EN JAMBOL AKTIVAS

Laŭ iniciato de la societo en septembro pasintjare en la kadro de la tutpopola turista marŝo „Laŭ la fajra postsigno de Septembro 1923—1944“ estis organizita vizito al vilaĝo Tenevo, distrikto de Jambol — naskiĝloko de la partizano-esperantisto Koljo Tenev (Ravaŝolata). Oni metis florojn antaŭ la tombo de la heroo.

En la grupo de jambolanoj estis la ekspartizanino Gergana Teneva — fratino de la heroo, kaj Ivan Jelev — kamarado de Koljo Tenev kaj sekretario de la komunuma partia komitato.

En la Domo-muzeo de familio Tenev Gergana Teneva rakontis pri la partopreno de la familio en la antifaŝisma batalo (ĝi donis kvar partizanojn, unu interbrigadiston en Hispanio kaj unu politikan malliberulinon) kaj pri la esperanta agado de Koljo Tenev.

\* \* \*

La 9-an de novembro 1984 en la klubo de E-societo „M. Gorkij“ okazis renkontiĝo de esperantistoj el la urbo kun la ekspartizano Georgi Ĉapârov, kiu rakontis pri la heroo batalo de la partizana taĉmento „Petâr Momĉilov“ (VI-a ribela operacia zono).

\* \* \*

La Distrikta Junulara Domo kaj E-societo „M. Gorkij“ organizis junularan diskovesperon „Esperanto — fenestro al la mondo“ (el la serio „La paco — espero de la planedo“).

Galina Gavrailova — direktorino de la Distrikta Junulara Domo, salutis la partoprenantojn. Georgi Jordanov, prezidanto de societo „Maksim Gorkij“ — parolis pri la rolo de la Internacia Lingvo en la pacbatalo.

Estis prezentita belarta programo kun partopreno de gastoj el Plovdiv — grupo pri deklamado, gvidata de la profesia aktorino Kirova kaj Folkloro E-grupo, kiu plenumis esperantajn kantojn. Fine Penka Papazova deklamis siajn versaĵojn.

MARIANA GEORGIEVA

## PROGRAMO

de la Internacia E-Kursejo (IEK) en Pisanica  
por 1985

17—22. 3. 1985 — Kurso por ĉiĉeronoj — kunlaborantoj de IEK en la lando kaj eksterlandoj (kunlabore kun la Buroo por Junulara Turismo „Orbita“). La gekursanoj trapasos ekzamenon (inkluzive de Esperanto).

1—10. 4. 1985 — Prepara kurso por partopreno de infanoj en la Asembleon „Standardo de la Paco“ (okazonta en Sofio — aŭgusto 1985)

7—14. 4. 1985 — Printempa E-renkontiĝo

17—19. 5. 1985 — Seminario por prezidantoj kaj sekretarioj de DE de BEA — pri organizaj problemoj.

18—22. 5. 1985 — Renkontiĝo de agraranoj-esperantistoj.

15—30. 5. 1985 — Kurso de tradukarto por junaj esperantistoj. Enkonduko en la principojn de la tradukarto surbaze de la bulgara kaj tutmonda sperto tiurilate. Tradukoj de anticipe preparitaj fragmentoj.

23—26. 5. 1985 — Renkontiĝo de esperantistoj-fervojistoj.

20—30. 6. 1985 — II Internacia ŝaka E-seminario.

1—20. 7. 1985 — Tradiciaj 20-tagaj instruistaj E-kursoj de I, II kaj III grado kaj por instrurajtoj.

21—30. 7. 1985 — II Internacia junpionira E-tendaro — kurso de Esperanto, sportaj ludoj, vizito al la junpionira domo en Smoljan, ekskursoj ka.

1—20. 8. 1985 — Tradiciaj 20-tagaj instruistaj de E-kursoj de I, II kaj III grado kaj por instrurajtoj.

21—30. 8. 1985 — II Internacia renkontiĝo de E-ĥoroj — kurso de Esperanto, lekcionoj pri hora kantado, ekskurso-turneo.

1—10. 9. 1985 — Kvalifika kurso por preparo de E-kadruoj el la socialismaj landoj.

11—17. 9. 1985 — Internacia simpozio „Esperanto kaj turismo“ — ekspozicio de reklamaj turismaj materialoj, projekciado de filmoj pri turisma temo, ekskursoj, subskribo de kontraktoj pri kunlaborado inter esperantistaj turistaj organizaĵoj por 1985.

1—6. 10. 1985 — Renkontiĝo de esperantistoj-pentristoj.

6—14. 10. 1985 — I Internacia festivalo de esperantistoj-kino- kaj fotoamatoroj „Rodopa Aŭtuno“ — ekspozicio kaj konkurso de belartaj fotografaĵoj, revuo de amatoraj E-filmoj, konkurso por plej bona E-filmo pri Esperanta temo, intersaĝo de sperto.

13—20. 10. 1985 — Internacia E-renkontiĝo de dancensembloj.

21—27. 10. 1985 — Seminario de Bulgara Esperantista Junularo (BEJ) — kun internacia partopreno, lige kun la 100-jariĝo de Esperanto.

1—3. 11. 1985 — Seminario pri temo: „100 jarojn Esperanto“.

8—10. 1985. — Oratora konkurso — nacia revuo de oratoroj-esperantistoj, lingva kaj metodika helpo, konkurso kun premioj.

6—9. 12. 1985 — Renkontiĝo de studentoj-esperantistoj (lige kun la studenta festo — 8-a de decembro)

12—16. 12. 1985 — Seminario de literaturistoj — aŭtoroj kaj tradukistoj de belarta kaj scienc-teknika literaturo en Esperanto.

29. 12. 1985—1. 1. 1986 — Novjara internacia E-renkontiĝo — novjara amuza programo, „parolanta rondo“, projekciado de E-filmoj, diskoteko, ekskursoj.

### TUTJARAJ E-KURSOJ EN IEK — PISANICA 1985

|            |       |                         |
|------------|-------|-------------------------|
| Januaro:   | 3—16  | I kaj II grado          |
|            | 16—29 | I kaj II grado          |
| Februaro:  | 1—14  | I kaj II grado          |
|            | 15—28 | I kaj II grado          |
| Marto:     | 1—14  | I kaj II grado          |
|            | 16—29 | I kaj II grado          |
| Aprilo:    | 1—14  | I, II kaj III grado     |
|            | 16—29 | I kaj II grado          |
| Majo:      | 3—16  | I kaj II grado          |
|            | 17—30 | I kaj II grado          |
| Junio:     | 1—14  | I, II kaj III grado     |
|            | 16—29 | I, II kaj III grado     |
| Julio:     | 1—20  | I, II, III kaj IV grado |
|            | 20—31 | I kaj II grado          |
| Aŭgusto:   | 1—20  | I, II, III kaj IV grado |
|            | 21—30 | I kaj II grado          |
| Septembro: | 1—14  | I kaj II grado          |
|            | 16—29 | I kaj II grado          |
| Oktoebro:  | 1—14  | I kaj II grado          |
|            | 16—29 | I kaj II grado          |
| Novembro:  | 1—14  | I kaj II grado          |
|            | 16—29 | I kaj II grado          |
| Decembro:  | 1—14  | I kaj II grado          |
|            | 15—28 | I kaj II grado          |

### RIMARKO:

La kotizoj por la 14-tagaj kursoj por lernado de Esperanto — I kaj II grado estas: ĉambro kun 2 litoj — 137 levoj, 3—4-lita ĉambro — 123 levoj, 6-lita ĉambro — 109 levoj. La prezo inkluzivas plenan pensionon, 42 lernohorojn, ekzamenpagon, dokumentojn.

Por la 20-tagaj instruistaj kursoj BEA garantias monhelpon je sumo de 40 levoj por ĉiuj partoprenantoj-bulgaroj, kiuj sukcese ekzamenigis pri ĉiuj gradoj. La kotizoj estas: 2-lita ĉambro — 140 levoj, 3—4 lita ĉambro — 120 levoj kaj 6—8-lita ĉambro — 100 levoj (la prezoj inkluzivas plenan pensionon, 62 lernohorojn, konsultiĝojn, ekzamenpagon, dokumentojn).

Rabato: ĉe pago de la kotizo ĝis 30-a de marto 1985 — 10% kaj ĝis la 31-a de aprilo 1985 — 5%.

De la Direkcio de IEK

**Belgio.** S-rino Yo Steyaert, Schotlandstraat 73, B-1060, Bruselo.

**Britio.** S-ro Paul Hewitt, Highfield Road, North Thoresby, Grimsby, South Humbertide DN 36 RT.

**Ĉeĥoslovakio.** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS-110 00 Praha 1. Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

**AESSR.** Sobotské náměstie 1735, CS-058 01 Poprad. Jarabono — kiel supre.

**Danlando.** S-ro J. H. Eriksen, Torholmsvej 26, DK-9800 Hjørring; Poŝtkonto: 771.77 R. Jarabono: 38 kr.

**Federacia Respubliko Germanio.** S-ro Roland H. Hegen, Schlossgasse 30, D-6738 Elmstein. Jarabono: 8 DM

**Finnlando:** Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 Kuopio 10. Jarabono: 24 fmk.

**Francio.** S-ro Gilbert Gerrier, Esperantista Federacio de Laboro, 179, rue Ordener, 75018 Paris; tel. 252.19.36. Jarabono: 20 ff.

**Germana Demokratia Respubliko.** Esperanto-Asocio, Centra Estraro, Charlottenstr. 60, 1080 Berlin.

**Hispanio.** S-ro Adonis Gonzales Meana, str. Marcelino Gonzalez, 5—4, D Gijón-9 (Asturias); tel. (985) 15 15 34. Por leteroj kaj korespondaĵoj: Apartado 242 Gijón — Asturias. Jarabono: 300 pesetoj.

**Hungario.** „Budapeŝta Informilo“, p. k. 153, H-1443, Budapeŝto. Jarabono: 60 forintoj.

**Japanio.** S-ro Yoshiaki Mizumo, 327, Kitairiso, Sayamasci, Saitamaken 350—13. S-ro Nanba Syōzi, Hiruiti 3-13-26, Zuoto-ku, Osako 536. Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

**Kubo.** S-ro Pedro P. Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.

**Luksemburgio.** S-rino Germaine Hoffmann, 19, rue J. B. Esch, L-1473 Luksemburgio; tel. 44.49.34.

**Madagaskaro.** S-ro Justin Randriamampionena, Lot: VA 20-BA Tsiadana, 101, Antananarivo. Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

**Malto.** S-ro Anthony Mercieca, 20, Valletta Road, Qormi Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

**Pollando:** S-ro Lech Kosiniak, str. Piekna 16 b/g PL 00539 Varsovio.

**Portugalo.** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto, 6 R/C A, P-1500 Lisbono. Jarabono: 260 eskudoj.

**Sovet-Unio.** Ĉefperanto Tutunia: Alar Kihun, str. Hiiu 5—5 SU-200016 Tallinn, Estonio. Perantoj-helpantoj: Johannes Palu, USSR, SU-200016 Tallinn, Sólme 21

**Abromas Laimundas,** SU-234432, Jubarko raj., Pilis pŝt., Litovio.

**Kulikov Vsevolod V.,** SU-644112, Omsk-112, ab, jaŝĉ. 1624.

**Leo Medvedev,** SU-129128 Moskva, pr. Mira 196 — 44.

**Svedio.** S-ro Tord Suard, Lingvagen 201, S-1235 Farsta. Jarabono: 5 us. dol.

**Vjetnamio.** Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107, Quan Thanh, Hanoi. S-rino Vũ Thanh Huong, 20 Ly Thai To Vie.

**Vien Ngon ngu hoc,** Hanoi.

|                                                                               |         |
|-------------------------------------------------------------------------------|---------|
| D. ĤAĜIEV. Porpaca voĉo de verkistoj . . . . .                                | II      |
| K. IVANOV. Regu pacos sur la Balkanoj . . . . .                               | 1, 2, 3 |
| D-ro J. POPOVA. Kvara Nacia Medicina E-konferenco . . . . .                   | 3, 4    |
| R. AGONCEVA. Akusistina festotago . . . . .                                   | 4       |
| J. TODORIEV. Kurso por esperantistaj ĵurnalistoj . . . . .                    | 5       |
| N. NIKOLOV. Utila kaj necesa kunlaboro . . . . .                              | 6       |
| D. MUTUŜEV. Esperanto-tradukistoj . . . . .                                   | 6       |
| * * * <b>Pezio</b> . . . . .                                                  | 7       |
| Ĥv. ESEROV. Kiel oni organizis la helpadon de Tr. Ĥristovski . . . . .        | 8       |
| * * * Bulgaraj esperantistoj pereintaj en la kontraŭ-faŝisma batalo . . . . . | 9, 10   |
| V. CVETKOVA. Japanio — malproksima kaj proksima . . . . .                     | 10, 11  |
| N. ALEKSIEV. Nova minaco al Eŭropo: kiu kulpas? . . . . .                     | 12      |
| H. M. PHUNG. Esperanto en universitato . . . . .                              | 13      |
| * * * Enlanda movado . . . . .                                                | 14, 15  |
| * * * Programo de IEK — Pisanica . . . . .                                    | 16      |
| * * * Niaj perantoj . . . . .                                                 | III     |
| M. KANEVA. Novjaraj popolfestoj . . . . .                                     | IV      |

## KUNLABORANTOJ, ATENTU!

Se vi volas sendi kontribuojn por „BE“, ĝi estu konciza, verkita en bona lingvo, klare tajpita aŭ mane skribita, kun duobla interlinia spaco kaj margeno (sen mallongigoj, sen tutaj vortoj tajpitaj per majuskloj). La materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitaj linioj, nur en tre gravaj kazoj — ĝis 90 linioj, sur blankaj paperfolioj de normala formato. Ĉiu tajpita linio konsistu el 65 tajposignoj (inkluzive la intervortajn spacojn).

La Redakcio akceptas la originalan (unuajn) ekzempleron de la tajpaĵoj, ne la kopion. Skribu klare viajn nomon kaj kompletan adreson en nacia lingvo!

Korespondaĵojn pri okazintaj aranĝoj oni sendu ĉiam tuj post la aranĝo. La grupfotoj estu interesaj, movoplenaj, bonkvalitaj (prefere nigra-blankaj), en poŝtkarta formato.

Limdato por kontribuoj: la materialoj venintaj ĝis la 15-a de ĉiu monato, aperos en „BE“ post du monatoj. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn!

## SCIIGO

Novaj rekonitaj E-lektoroj:

FANI MIĤAJLOVA — Plovdiv  
KIRIL VELKOV — Vraca

Korajn gratulojn kaj bondezirojn por plua aktiva E-instruado!

## NI KONDOLENCAS

Forpasis la esperantisto-veterano el Gabrovo

PETKO VÁLEV

kontraŭfaŝisto, abstinenculo, stenografo — modelo de abnegacio kaj sindonemo al la E-movado en Bulgario  
Niajn profundajn kondolencojn al liaj hejmanoj!

Sur la kovrilpaĝo:

Vintra ĝojo

Foto: Emilia Kirilova

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BĀCEV, Vasil BORUVAN-SKI, Radoslav DOJĈINOV, Prof. d-ro Kiril POPOV, Dimitar ĤAĜIEV, Krāstju KARUCIN

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordono „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:  
„BULGARA ESPERANTISTO“  
Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

P. K. 66

1 000 Sofio

## NOVJARAJ POPOLFESTOJ



En siaj festoj nia popolo elmontras la riĉecon de sia vivosperto kaj saĝo, sian talenton de kreanto, sian amon al la vivo, siajn moralajn virtojn. Aperintaj en malnovtempo, ili estas kombino el muziko, parolo kaj aplikata arto.

Iuj el la plej karakteraj popolfestoj estas la novjaraj ritoj — „survakane“ — gratulfrapado per „survaĉka“ (kornusarba speciale ornamita branĉeto), „Koleduvane“ (ritoj, tre similaj al la novjaraj, ligitaj kun la kristnasko), „Laduvane“ (prikantado de la fingroringoj). Kun la novjara festo estas intime ligita ankaŭ la tradicia festa manĝotablo.

Nia popolo kun aparta ĝojo atendas kaj festas la Novjaron — festo tre malnova, tamen ĉiam juna. En tiu tago la dommastrino majstre preparas ritan panon, ornamitan kun bildoj de la gren- kaj vitkampoj, de la ĝardeno, ŝafejo ktp. Poste ŝi aranĝas abundan manĝotablon, sur kiu aperas bongustaj manĝaĵoj, sekaj fruktoj, pomoj, vinberoj, nuksoj. Nepra ero de la festa menuo estas la tavolo kuko kun enknedita argenta monereto kaj kornusburĝonoj, per kiuj oni divenas la bonŝancon de la familianoj. El kornusbranĉeto oni preparas ankaŭ la t. n. „survaĉka“ aŭ „survaknica“ (kornusbranĉa gratulfrapilo), kiu apartenas al la rekvizito de la bulgaraj novjaraj ritoj. La etimologia esploro de la vorto „survaĉka“ en la bulgara lingvo kondukas al la signifo „kruda branĉeto kun vivanta suko kaj burĝonoj“. En la diversaj landregionoj krom la kornusajn, oni uzas ankaŭ branĉetojn de aliaj sovaĝaj aŭ kulturaj fruktarboj.

Laŭ malnova kutimo la „survaĉka“ devas esti enpikita en la tavolo kukon aŭ metita sur ĝin dum daŭras la festa manĝo. Post plenumo de ĉiuj ritoj, ligitaj kun la manĝotablo, la plej aĝa viro en la familio prenas ĝin kaj, frapante per ĝi ĉiujn familianojn, benas ilin esti sanaj kaj bonŝancaj dum la nova jaro. Post li sammaniere vicigas ĉiujn familianojn. Fine la plej eta infano en la familio prenas la kornusbranĉeton kaj bondeziras al ĉiuj sanon kaj feliĉon.

La „survakado“ fare de la junaj fraŭloj estas rito, kiu eliras el la kadro de la familia novjara festeno kun la novjara manĝotablo kaj ĝiaj simboloj de prospero kaj feliĉo. Ĝi konfirmas la virigon, la maturigon de la junuloj, ilian kapablon labori kaj krei propran familion. La junuloj vizitas laŭvice ĉiujn domojn, kantante ritajn kantojn kaj benante la dommastrinojn. Ili estas atendataj kiel heroldoj de la bono.

Interesa fenomeno estas la „survakari“ en Okcidenta Bulgario, kiuj kovras siajn vizaĝojn per maskoj, prezentantaj bildojn de bestoj, precipe kun ekonomia signifo — kaproj, ŝafoj, ĉevalo, urso ktp. (Tiu praslava kutimo, evidente, estas ligita kun la ĉassezono).

En preskaŭ ĉiuj landregionoj, paralele kun la „survakado“ ekzistas ankaŭ „koleduvane“. Novjaro kaj „Koleda“ havas la saman ritan signifon, ligitan kun atendado de la printempo kaj la nova somero kun ĉiuj bonaĵoj ilin akompanantaj. La bulgara vorto „koleda“ devenas de la latina „kalende“, kio signifas novjaro.

Bela kaj poeziplena rito el la novjara ciklo estas ankaŭ la tiel nomata „Laduvane“ aŭ „prikantado de la fingroringoj“. En iuj lokoj ĝin oni plenumas ĉirkaŭ bele ornamita granda kornusbranĉo — „surovak“. La junulinoj metas en kaldronon kun akvo siajn fingroringojn, alligatajn al geranifloraj bukedetoj. loloke la kaldronon kun la fingroringoj oni lasas tranokti sub rozarbusto. La sekvan matenon tute juna knabino elprenas unu post la alia la fingroringojn el la akvo kaj la junulinoj, kantante, divenas al kiu ili edziniĝos.

La novjara bulgaraj ritoj estas simbolo de sano kaj longvivado, ili esprimas la kredon de la popolo, ke ankaŭ en la nova jaro kreskos kaj abundos la greno, multigos la brutaro, estos ĝojo kaj bonhumoro en ĉiu domo.

MARIANA KANEVA

